Aperas almenaŭ 8-paĝa kun 4-paĝa aldono „2. Sprache für Alle“ la 10. de l' monato.

Iras tutmonden

Aŭstria Esperantisto

Oficiala organo de Internacia Esperanto-Muzeo, Aŭstria Esperanto-Asocio, Esperanto-Varbadservo p. Aŭstrio

Leteradreso: Wien, I., Neue Burg, Telefono R-27-803.

Jarabono komencebla ĉiumonate por Aŭstria š 4.60, aliaj landoj svfr. 4.25 (9 poŝtrespondkuponoj). Poŝtŝparkaso-konto aŭstria D 123.826.

Ne ĝustatempa malmendo de nia gazeto devigas al plupago de la jarkotizo por la sekvonta jaro.

N-ro 1 (150) Korneuburg ĉe Wien, la 10. januaro 1938. 15. jaro

OTTO DE AŬSTRIO PRI ESPERANTO.

Mi sendis al la Plej Alta Rezidejo en Steenockerzeel mian lernolibron „Freude durch Esperanto“, ŝlosilon, vortareton kaj E.-broŝurojn pri Aŭstrio kaj ricevis jenan por la esperantistoj ĝojigan respondon:

Steenockerzeel, am 2. Dezember 1937.

Sehr geehrter Herr Hofrat Steiner !

Seine Majestät der Kaiser haben die von Ihnen übersandten Büchlein und Broschüren über das Esperanto mit Interesse entgegengenommen und haben mich beauftragt, Ihnen dafür den besten Dank zum Ausdruck zu bringen.

In dieser ernsten Zeit ,wo Hass und Neid Völker sich gegeneinander erheben lasst, darf kein Mittel übersehen werden, das mithelfen kann, bestehende Feinschaften und Zwistigkeiten zu beseitigen.

Möge das Esperanto durch bessere Verstandigungsmöglichkeit unter den Völkern eines jener Mittel sein, welches dazu angetan ist, an der Befestigung und der Sicherung des Friedens mitzuhelfen, dessen die Welt so dringendst bedarf , und für den unsere Dynastie stets gewirkt hat.

Im Allerhöchsten Auftrage:

Otto Graf Trauttmansdorff

Otto de Aŭstrio,

la unua filo de la mortinta Karl I.,
imperiestro de Aŭstrio, reĝo de Hungarujo ktp.

Steenockerzeel, la 2-an de decembro 1937.

Tre estimata sinjoro Hofrat Steiner!

Lia Majesto la Imperiestro akceptis kun intereso la libretojn kaj broŝurojn pri Esperanto, senditajn de Vi, kaj komisiis min, esprimi al Vi pro tio la plej bonan dankon.

En tiu ĉi serioza tempo, kiam malamo kaj envio instigas la popolojn sin levi unu kontraŭ la alia, nenia rimedo devas esti pretervidata, kiu povas kunhelpi forigi ekzistantajn malamikecojn kaj malpacojn.

Estu Esperanto per pli bona ebleco de reciproka kompreniĝo inter la popoloj unu el tiuj rimedoj, kiuj estas destinitaj kunhelpi en la firmigo kaj la sekurigo de l' paco, kiun la mondo tiel urĝege bezonas, kaj por kiu nia dinastio ĉiam estis aganta.

En la Plej Alta Komisio: Grafo Trauttmansdorff.

30-a Universala Kongreso de E.

London, 30. julio—6, aŭg. 1938.

Adreso: Sekretario de 30. Univ. Kongreso de Esperanto, Heronsgate, Rickmansworth (Herts), Anglujo.

Kotizoj: Ĝis 31. 3. 1938 Funto 1-5-0, poste 1-10-0. Edzo aŭ edzino de kongresano kaj gejunuloj ne pli ol 20-jaraj pagos la duonon, plej bone en registrita letero per britaj ŝtataj monbiletoj. En Aŭstrio vi pagu al la ĉefdelegito aŭ. ŝ. 33.—, resp. 39.50 kaj la ĉefdel. anoncos vian aliĝon al London.

Blinduloj kaj ties gvidantoj ricevos senpagan kongreskarton post aprobo de iliaj aliĝoj flanke de s-ro W. P. Merrick, kasisto de Blindula Ligo, Penso, Shepperton, Middlesex, Anglujo.

Aliĝiloj haveblaj ĉe Int. E.-Muzeo kaj la ĉefdel. de IEL en Aŭstrio, ankaŭ ĉe via landa organizo.

Donacoj volonte akceptotaj. Ĝis nun L 8-8-3 estas pagitaj.

Blindula kaso jam ricevis donacojn de L 13-8-2, por ebligi al blinduloj la partoprenon.

Glumarkoj: Belaj glumarkoj pri la kongreso haveblaj ĉe la ĉef- kaj la delegitoj. Uzu ilin, kiuj aspektas vere belaj. Prezo por 50 nur 2 int. resp. kup.

Loĝado. Kiel eble plej baldaŭ loĝmendiloj estos dissendataj.

Hoteloj: Lito kun ampleksa matenmanĝo 4½—14 angl. ŝ. Oni intencas aranĝi pli malkarajn loĝejojn.

Manĝoj: La ordinara prezo por lunĉo 1—3½, temanĝo 9 pencoj—2 ŝ; vespermanĝo 1½—5 ŝ.

Fakaj kunvenoj: Organizontoj bonvolu anonci frue siajn dezirojn.

Oficiala organo: Ĉiu kongresano ricevos la gazeton The BRITISH ESPERANTIST de januaro ĝis julio kaj poste la numeron, kiu enhavos la raporton pri la kongreso.

Provizora programo:

Sabaton: Interkonatiĝa vespero.
Dimanĉon: Oficiala inaŭguro — Diservoj — Muzika Vespero.
Lundon: Laborkunsidoj — Fotografado — Teatraĵo.
Mardon: Fakaj Kunsidoj — Neformala Vespero.
Merkredon: Tuttagaj kaj Duontagaj Ekskursoj.
Jaŭdon: Laborkunsido — Popol-danco kaj Koncerto.
Sabaton: Fermo.

Vojaĝ-oficejo: La oficiala estas Cook. En Aŭstrio peras ĉiujn servojn Oesterr. Verkehrsbüro, Wien, I., Friedrichstraße 7.

Aliĝis: Ĝis 31. 12. 1937 entute 534 personoj el 22 landoj. ANKAŬ VI NE MANKU INTER LA ALIĜONTOJ!

InternaciaE-Ligo, filio Stockholm.

S-ro Malmgren tre vigle laboras kaj helpas per dissendo de cirkuleroj kaj konsiloj al la landaj asocioj: 1. li dissendis raportojn kaj konkludojn de la Pariza Konferenco, aludante, ke ĉi tiu lerte kompilita raporto pri la rezultoj de la Konferenco estas tre utila kiel bazo por estonta laboro, speciale kiam temas pri sinturno al oficialaj instancoj; 2. li donas konsilojn a) kiel gajni monon por la kluba kaso (tre grava!),

Martira kanceliero d-ro Dollfuß.

Je la nomfesto de la mortinta kanceliero d-ro Engelbert Dollfuß, la 7. de novembro, en Michaeler-preĝejo, kie la kanceliero ofte restadis en preĝado, ĉi tiu reliefo de skulptisto Hans Schwathe estis inaŭgurata en la Dollfuß-votivkapelo.

b) pri turismo, c) pri gazetara servo; 3. li atentigas pri a) estrarkunsidoj, b) propaganda fondo, c) monkolekto por propaganda fondo, d) teatraĵoj, por akceli la viglecon de la kluba laboro, 20 diversaj estas haveblaj por po 2 resp. kup.; kaj fine li donas modelajn statutojn por propaganda fondo.

Grupoj petu informojn de viaj Landaj Asocioj!

Tutmonda Adresaro de la Esperantistoj 1938 (TAE).

Laŭ promeso TAE aperis je la naskiĝtago de nia majstro. Certe ĝi ne ankoraŭ estas perfektaĵo, sed ĝi enhavas multon, kion la s-anoj povos uzi: Liston de la organizoj tutmondaj kaj landaj, de grupoj kaj de la nun aperantaj gazetoj, revuo, bultenoj ktp.

Ni deziras pliperfektigi la Adresaron 1939 kaj petas la helpon de ĉiuj organizoj kaj unuopuloj. Por doni ĉi tiun helpon, bonvolu tuj mendi ĉi tiun nuntempe unikan helpilon kaj propagandilon. La prezo 4 int. resp. kup., en kiu la afranko estas enkalkulata.

Sed grupoj kaj unuopuloj nepre bezonas la libron, kiu estas presita sur la plej bona papero kaj havas belan kovrilon, jam pro tio, por havi la eblecon, propagandi kaj varbi ĉe oficialaj instancoj, kaj ankaŭ por eluzi la adresmaterialon. Ĉe oficialaj instancoj la libro bone efikas, kion montras dankleteroj ricevitaj de la aŭstriaj Ŝtatprezidanto, Ministro de Komerco prof. d-ro Taucher, Urbestro de Wien Schmitz, Prezidanto de Fervojoj Stockinger k. a.

La venonta eldono estos iomete pli bone aranĝata, sur ĉiu paĝo estos sur la marĝenoj la nomoj de la landoj; novaperintaj libroj enestos kaj diversaj aliaj aferoj, kiuj en la unua eldono ne havis lokon.

Laŭ la ricevitaj dankleteroj de la s-anaro tutmonda la libro plaĉas kaj plene plenumos sian celon, helpi al la samideanoj en ĉiuj rilatoj de la propagando kaj korespondado!

Kelkcent libroj ankoraŭ estas je dispono, **mendu tuj!** La eldonanto: Steiner, Bisamberg, Aŭstrio.

Leteradreso: Wien, I., Neue Burg.

Pri Novzelando.

Originala raporto de Anton Vogt, Wellington.

Ĉe ni, dank' al la energio kaj entuziasmo de kelkiuj — kiel ekzemple Vernon J. Leck (Lecaldano), redaktoro de Internacia Ideo, W. H. King, sekr. de N. Z. E. A., Bertram Potts kaj aliaj, la afero floras.

La loka Klubo jam havas preskaŭ 150 anojn. Ni kunvenas (kutime venas ĉirkaŭ 80) ĉiun semajnon, por mallonga komerco, horo de studado kaj horo de distrado diversspeca (paroladoj, skizoj, teatraĵoj, dancoj...). „Ne tro da laboro; ne tro da amuzo — kaj tiom da Esperanto kiom oni kapablas...!"

Kreskanta intereso pri E. en Anglujo.

En 1936 Brita Junulara Pacmovado adoptis rezolucion, rekomendantan al Mondjunulara Movado, ke ĝi akcelu la disvastigon de Esperanto. Ĉi tiu rezolucio estis sendita al la Naciaj Junularaj Porpacaj Movadoj.

La 23. de oktobro 1937 en la Edukada Komisiono de Kongreso de Internacia Pacmovado, Sekcio Brita, s-ano E. D. Durrant-London parolis rekomende al E. kaj la kunveno decidis, ke ĝia Konstanta Komitato pristudu la demandon de Internacia Helplingvo. La prezidanto de ĉi tiu kunveno estis prof. Gilbert Murray, prezidanto de Plenumkomitato de la Unuiĝo por la Ligo de Nacioj.

Nun ĉiu asocio, grupo kaj individuo bonvole okupiĝu pri la afero: 1. salutu pro la decido pristudi la demandon de Int. Helplingvo, esprimante la esperon, ke ĝi antaŭenigos la uzon de E. por helpi la internacian interkomprenon kaj amikecon kaj skribu al Eduka Komitato, League of Nations Union, 15, Grosvenor Crescent, London, S. W. 1; 2. laŭeble publikigu ĉi tiun informon en via gazetaro, sendante gazeteltranĉojn al s-ro E. D. Durrant, 263, Kings Court, Alexandra Ave., Harrow (Middlesex), Anglujo; 3. sciigu s-ron Durrant pri la rilatoj kun viaj naciaj asocioj por Ligo de Nacioj aŭ Mondjunulara Porpaca Movado.

RADIO

Radio-Wien: 14. I., „Nova Viena Filmaro", parolas kortega kons. Steiner, je 22 h 30.

Radio-Roma: La itala registaro, komprenante la grandan valoron de Esperanto, plidensigis la Radio-disaŭdigojn, kiuj nun okazas de la stacioj Roma II (ondo 245 m) kaj 2 RO (31.13 m). ĉiun sabaton de 19 h 10 — 19 h 26 pri turismo kaj de Roma I (420.8 m) kaj 2 RO (31.13 m) ĉiujn lundon kaj ĵaŭdon pri politikaj aferoj, la plej gravaj italaj kaj eŭropaj okazintajoj.

Radio-Paris: 3. I., 22 h 45 „La verbo ami" (komedio), 10. I., 23 h „Kabaredo" — „Kio nova" (revuo), 17. I., 22 h 45 „La paco", 24. I., 22 h 45 „La nobela burĝo", 31. I.,

22 h 45 „Sokrato“ (dramo). Skribu al „Courrier des Auditeurs, Service de la Radiodiffusion, 107 rue de Grenelle, Paris VII.“

Radio-Roma.

IV-a **Konkurso** inter la radio-aŭskultantoj de la „Italaj Turismaj Kronikoj“.

Povas partopreni ĉiuj Radio-aŭskultantoj kaj la konkursantoj devos tuj sendi al „Direzione Generala por il Turismo — IV. Concorso Radio, Via Vittorio Veneto 62, Roma“ poŝtkarton kun jena teksto: „La subskribinto intencas partopreni la kvaran Konkurson, aŭskultante la paroladojn, kiuj estos disradiataj en la lingvo Esperanto. Plena adreso, la lando nacilingve.“ La lasta anonctempo estas la 9. januaro, sed ĉar ni ne povis pli frue anonci la konkurson kaj la E-disaŭdigoj nur komenciĝos la 15. de januaro, anoncu vin nepre ĝis la 14. de januaro, menciante la aluditajn faktojn.

La sin anoncinto ricevos konfirman dokumentaron (poŝtkarton kune kun loteribileto).

En ĉiuj paroladoj (por E. la 15., 22. kaj 29. januaro) estos envicigitaj kvar ekstertekstaj vortoj, kiuj estos eldiritaj post atentigo. La konkursantoj notu ilin fojon post fojo. Je la fino de la Konkurso la aŭskultantoj, kiuj kaptis la tri koncernajn paroladojn en E., estos ricevintaj kompletan frazon, konsistanta el dekdu vortoj.

Post eltranĉo de la loteribileto estas nepre necese, ekspedi al Roma ĝis la 5. de februaro plej malfrue la poŝtkarton, kompletigata per la aŭskultita frazo. Post kontrolo de la revenintaj kartoj oni lotumos.

8 premioj, konsistantaj el fervojbiletoj de landlimo al Roma kaj reveno en 2-a klaso kaj el 15 hotel-kuponoj por plena pensiono laŭ hotelkategorio B.

La disaŭdigoj okazos de la stacioj:

Roma II, 245 m, kilocikloj 1222 (relajse) 2 RO, mallongaj ondoj, 31.13 m — kilocikloj 9635 je 18 h 10 (Greenwich) aŭ 19 h 10 (M. E. T.) en jenaj tagoj: lunde (france), marde (angle), merkrede (germane), vendrede (nederlande) kaj sabate (Esperanto). Nur en unu lingvo oni povas partopreni, do en Esperanto!

INFORMOJ EL AŬSTRIO

Redono de la havaĵo al la Habsburg-anoj.

La 16. de decembro 1937 en la leĝdonanta korporacio „Bundestag“ la raportanto d-ro Adamowich citis en sia raporto koncerne al la leĝo „Redono de la havaĵo al la Habsburg-anoj“ la eldiron de d-ro Seipel „Aŭstrio ne volas havi maljustan havaĵon, sed la Aŭstria Respubliko bezonas puran konsciencon“. Li daŭrigis: „Per efektivigo de la nuna leĝo jarojn longdaŭra grava maljustaĵo estas rebonigata.“

•

Virina kunveno dum la katolikaj kultursemajnoj en Aŭstrio 1938.

Budapest pretigas la 34. Internacian Eŭkaristian Kongreson. La katolika Aŭstrio ne deziras pasigi ĉi tiun okazon, sen konatigi la multnombrajn travojaĝantajn katolikojn el tutmondo kun la katolika kulturvalorajaro sur aŭstria teritorio. Tial de 22. de majo ĝis parto de junio okazos en Wien kaj en la federaciaj landoj de Aŭstrio la katolikaj kultursemajnoj.

Ankaŭ la katolikaj virinoj en Aŭstrio deziras eluzi ĉi tiun okazon. Ili aranĝos grandan kunvenon kaj invitas siajn fratinojn el tutmondo al ĝi. Internacia Unio de Katolikaj Virinligoj havos en ĉi tiu tempo en Wien sian estrarkunsidon. Aliĝe okazos diversaj aranĝoj por ĉiuj virinoj katolikaj, kiuj montru, en kia grado la aŭstria virino partoprenas en la kreado kaj konservado de aŭstriaj kulturvaloroj.

La preciza programo estos publikigata en la venontaj numeroj de nia gazeto. Ĉiujn informojn direktu al: Hauptstelle Frauen der Katholischen Aktion, Wien, I., Stephansplatz 3, ankaŭ en Esperanto.

Prezidoficejo de urbo Wien.

Pr. Nro. 3468/37.

Wien, la 27. de decembro 1937.

Tre estimata sinjoro kortega konsilanto!

Sinjoro la Urbestro dankas kompleze por la afabla alsendo de Via Tutmonda Adresaro de la Esperantistoj kaj donas esprimon al la espero, ke Via organo „Aŭstria Esperantisto“, kiu en tiel brila maniero varbas por Wien kaj Aŭstrio, montru ankaŭ en la venonta jaro plej grandan disvastiĝon kaj belajn sukcesojn.

Sinjoro la urbestro plej kore respondas Viajn afablajn Novjardezirojn kaj sendas al ĉiuj aŭstriaj esperantistoj kaj al Viaj legantoj en la alilandaro siajn plej bonajn salutojn.

„Via afero kresku kaj floru“ *)

Komisiite:
D-ro Asperger,
Senata konsilanto.

*) Ĉi tiu frazo estis ankaŭ en la germana originalo en Esperanto.

Karnavalo en Wien.

Se oni nomas Wien kun rajto la urbon de ĉarmo, eleganteco kaj de la belaj inoj, ĝuste la karnavalo estas la tempo, dum kiu la urbo ĉiam denove pravigas ĉi tiun sian famon. La eleganteco, gajeco kaj senĝeneco ĉe la Vienaj balfestoj, de la noblaj reprezentaj balfestoj ĝis la popularaj kostumfestoj, estas io nur al Wien propraja, kaj ĉiuj tiuj plezurajoj havas specialan allogan forton por la fremdulo.

Sed ne nur la dancado estas la karakterizaĵo de Viena Karnavalo; ankaŭ la teatroj, unuavice la fama operdomo, kiel ankaŭ la tuta muzik- kaj artvivo prezentas ĝuste dum la karnavalo la plej elektitaĵon.

Specialaĵo de la karnavalo estas la intima interligiteco de la grandurbaj distraĵoj kun la plezuraĵoj de la vintrosporto en ĉiuj siaj brancoj. Eĉ ĉe malfavoraj neĝcirkonstancoj en la malaltaj regionoj veturado de 2 horoj sufiĉas, por atingi la ĉarmajn skiteritoriojn sur Schneeberg, Rax kaj Semmering. Tiel oni povas dumtage vintrosporti kaj vespere ĝui la plezurojn de grandurbo. La glacisporto estas en Wien mem hejma. Du grandaj artefaritaj glitkurejoj ebligas la praktikadon de ĉi tiu sporto ĝis la printempo.

La plej reprezentaj balfestoj estas Balfesto en la „Operdomo“, la balfesto de Viena eleganteco, (15. jan.), „Balfesto de Urbo Wien“ en la festsalonegoj de Urbdomo, kiu la 3. febr. unuigos ĉiujn personojn de rango kaj famo kaj estos en la centro de la societa vivo dum la karnavalo; „Balfesto de Patriota Fronto“ en la festsalonegoj de Hofburg (imperiestra kastelo), la reprezenta balfesto de ĉiuj aŭstrianoj el la tuta lando (10. febr.).

Viena Festkomitato kore invitas vin: Venu al Wien por karnavali!

Detalan programon vi ricevos senpage de „Wiener Festausschuß“, Wien, VII., Messepalast.

Salzburg en 1938.

De d-ro Franz Rehrl, landestro de Salzburg.

Malgraŭ tre konsiderindaj malfacilaĵoj kiel la deviza leĝaro kaj valuto-malaltigo en la plej gravaj devenlandoj de niaj gastoj, la malriĉiĝo de larĝaj partoj de la burĝa vojaĝpubliko, la timo pro krizoj kaj militoj, la forveturado de enlandaj feriuloj al malmultekostiĝintaj eksterlandaj regionoj kaj fine malgraŭ malbonveterperiodo, kiu igis la someron 1937 pluva, la federacia lando Salzburg havis ĉiuloke almenaŭ la samajn fremdulfrekventciferojn kiel lastjare, kelkloke ankoraŭ pli bonajn.

Tio ne nur estis la sekvo de uzado de ĉiuj fortoj kaj de la oferemoj de la koncernaj rondoj, sed ankaŭ pro modera prezpolitiko kaj la forta volo per konstanta plibonigo kaj forigo de ankoraŭ ekzistantaj mankoj certigi la jam atingitan sukceson.

El la sanĝoj kaj plibonigoj la plej interesa certe estas la pligrandiga konstruaĵo de la malnova Festluddomo. La rapide kreskinta ŝatateco de la festludoj post la krizaj

Pagu afable vian abonon, ĉar ankaŭ ni devas ĝustatempe pagi la presadon! Koran dankon!

jaroj 1933/34 montris la nesufiĉon de la malnova domo kaj kaŭzis la pligrandigon per konstruo de nova scenejo kaj orkestrejo je la sudorienta flanko. La nova scenejo — 26 m kvadrate — superas ege la ĝisnunan. Novkonstruita 15 m profunda kaj 20 m larĝa kromscenejo multe faciligos la scenŝanĝojn, dume enigita rondhorizonto ebligos la rapidan malkovron de la fono.

Per novkonstruo de lumigadponto en la rigardantarejo kaj de 3 veturigeblaj lumigad-armaturoj por la diversaj lumigad-reflektoroj kaj lumigad-sofitoj sur la scenejo la ĝisnunaj lumigadefikoj ricevos esencan plibonigon. Ankaŭ nova estos la fera kurteno. La pligrandigita orkestrejo — 5½ m larĝa, 18½ m longa, 2 m profunda — estos reguligebla laŭ la alteco, por ke oni povu ankaŭ tiamaniere influi la sonefektojn.

La alteco de la nova ĉefscenejo estos 25½ m, tiu de la kromscenejo 10 m. Per la returnigo de la rigardantarejo estis ebligata la fondo de du promenejoj sur la loko de la iama scenejo.

La nova rigardantarejo ampleksos 1770 sidlokojn, do 400 pli ol ĝis nun. Sur la tegmento de la nova konstruaĵo estos teraso, ligata kun rondpromenejo, kaj donos al la festlud-gastoj la agrablaĵon de promeno en freŝa aero kaj de bela rondrigardo al la nokta urbo.

Grava por aŭtomobilistoj, biciklistoj kaj migrantoj!

En 1938 estos finkonstruita la ŝoseo Lofer—Saalfelden—Zell am See kun 40 pontoj kaj tralasejoj. En printempo la ŝoseo Salzburg—Anif estos finita. La Salzburg-a parto de ŝoseo trans Gerlos-montaron alproksimiĝas al la pretkonstruo.

Großglockner-altalparŝoseo, kies forta allogforto montriĝis en ĉiam pli kreskanta nombro de internacia publiko, ĉiam pli estos plikonstruata. Do en 1938 oni konstruos helpkablofervojon de Gamsgrube al sur la plej bela elrigarda pinto de Großglockner-montegaro, la 3332 m alta Fuscherkarkopf.

La elektrigo de linio Salzburg—Wien de Federaciaj Fervojoj jam estas komencita kaj en aŭtuno 1938, se ne pli frue jam, ni

Kanceliero d-ro v. Schuschnigg

parolas okaze de sia vizito en la kemia granduzino en Moosbierbaum kun la laboristoj. Je tiu okazo sulfacidfabriko, depost 7 jaroj ne plu laboranta, estis re-ekfunkcigata.

veturos sur la linio Salzburg—Attnang-Puchheim elektre funkciigate kaj tiel de Salzburg tra la mezo de Salzkammergut ĝis Steinach-Irdning elektre.

La Federacia Lando Salzburg esperas, ke ankaŭ dum 1938 multaj fremduloj — kiel kutime — vizitos nian landon!

Informojn havigos al vi Esperanto-Varbadservo por Aŭstrio, Wien, I., Neue Burg.

„Ĉu Tutmonda Adresaro 1938?"

„Kie ricevebla la longe sopirita?"

„Ĉe s-ano Steiner, Wien, I., Neue Burg, Aŭstrio!"

„Kiel pagi?"

„Per 4 intern-poŝtresp. kuponoj al s-ro Steiner aŭ pago al IEL en Heronsgate aŭ Literatura Mondo en Budapest. Tuj mendu, antaŭ ol la provizo elĉerpiĝis!"

A. S. Centra Esperanto-Librejo,

Bankastraat 10, 's-Gravenhage, Nederlando likvidis sian agadon. Fondita en 1920, kiam neniu alia kuraĝis eldoni librojn kaj tiel helpi la movadon en Nederlando, ĝi pagis ĉiujare mezdividendon de 5.93%, repagis nun la tutan garantian kapitalon kaj nun 6% findividendon. Ĝi likvidis ĉar sufiĉaj eldonantoj nun troviĝas en Nederlando.

Cseh-metodaj kursoj por infanoj.

De Julia Isbrücker, Den Haag.
Es Dansk Esperanto-Blad.

Pli kaj pli sentiĝas la bezono al taŭga instrumetodo por infanoj. Jam alvenas la tempo, ke ni devas esti pretaj por grandskale komenci la instruadon de Esp. al infanoj.

La postuloj por tia instruado estas:

1. La instruado devas esti almezurita al lernejaj klasoj, do taŭga por proksimume 30 infanoj.

2. La instruado devas esti tia, ke la infanoj daŭre mem vigle partoprenu.

3. La hejmtaskoj devas esti kiel eble plej multe limigitaj.

4. La instruado okazu prefere dufoje en la semajno dum 2 horoj.

5. La instruado de E. devas samtempe eduki la infanojn al internacia interkompreniĝado.

La Cseh-metodo baziĝas je la sekvantaj principoj:

a) Neuzado de lernolibro en la komenca kurso.

b) Neuzado de nacia lingvo, sed klarigo de la novaj vortoj per la jam instruitaj.

c) Komuna hora respondado.

d) Aplikado de konversacio pri aktualaĵoj anstataŭ uzado de lernejecaj ekzemploj.

e) Multa aplikado de humoro kaj ŝerco.

f) Instigo al tio, ke la lernantoj mem eltrovu la regulojn de la lingvo kaj ke ili mem konstruu la gramatikan sistemon.

g) Fremdlandano donu kurson.

Regna konsilanto, antaŭe lerneja inspektoro A. Rienks en Haag partoprenis kurson de Cseh kaj science montris la diferencon kaj superecon de la Cseh-metodo en komparo al aliaj rektaj metodoj, kiel Berlitz.

Ankaŭ oni organizu internaciajn renkontejojn de infanoj, kio nuntempe facile ebliĝas. Cseh-Instituto jam komencis aranĝi kuneston de gejunuloj en la Esperanto-Domo. Tio estas la komenco!

Hans Kell kaj liaj diversaj Goethe.

Transverso.

De Ernst Scheibelreiter.

Ernst Scheibelreiter, naskita en Wien 1897, vivas ĉi tie kiel poeto kaj verkisto. 1926 li ricevis „Artpremion de Urbo Wien" por poemoj; 1928 „Julius-Reichpremion" por la dramo „Revolucio en la vilaĝo", kiun Exl-aktoraro prezentas en Wien kaj Innsbruck. 1929 „Akcelpremion de Eckart-Ligo". 1932 poemvolumo en Gerstl-eldonejo „Amikeco kun la trankvilo". 1933 prezentado de dramo „Paŝtistoj ĉirkaŭ la lupo" en Viena Akademie-teatro kaj en Schauspielhaus Leipzig. 1934 „Granda aŭstria Statpremio" por la poemaro „La gaja rikolto" (Zsolnay-eld. Wien). En ĉi tiu ankaŭ la romanoj „La verda jardeko de Rudi Hofer" kaj „Ombroludo de la amo", 1937 la satira romano „La fuĝo el la filiŝtopaco" kaj „Premio de Aŭstria Kunststelle" por la nuntempa dramo „Mil viroj", kiu same kiel la historia „La monahino de Lisboa" (Arcadia-eld., Berlin) ankoraŭ sursceniĝu. Al sia patrourbo li metis monumenton en sia libreto „Wien kaj ĝia mondo" (Styria-eld., Graz).

Kun li Hans Kell konatiĝis jam kiel malgranda bubo ĉe sia onklo, kiu estis strangulo. Li havis monon, belan loĝejon kaj tamen li vivis sola kaj faris ĉiun laboron mem, ĉu frotadon de la planko ĉu tolaĵlavadon.

Ekstre li kolektis gravuraĵojn, antikvajn glasojn kaj ankaŭ tranĉis per la razilo reproduktaĵojn laŭ antikvaj majstroj el la ĵurnaloj, por konservi ilin en mapoj inter silkeca papero. Daŭre toleris ĉi tiu onklo nur unu estaĵon ĉirkaŭ si: ranon, kiu sur la folioplantoj en la fenestro de la fermita balkono embuske atendis muŝojn.

Kiam Hans estis je vizito, li kolerigis unue la ranon iomete; poste li kaŝiris al la malhela ŝranko kun la vitropordoj, kiu staris en la dormoĉambro. La vitropordoj estis acid-morditaj; nur kun kelkaj rubandoj drapitaj figuroj vidigis potencajn mamojn kaj femurojn; krome ili havis papiliflugilojn sur la dorso kaj ridetis.

Hans Kell tiam estis apenaŭ naŭjara; tial interesis lin ĉi tiu tro-abunda feinkarno ne ankoraŭ. Li ĝin simple trarigardis kaj vidis malantaŭ ĝi la diverskolorajn librodorsojn alloge brileti. Se li tiam turnis la ŝlosilon kaj la vitropordoj malfermiĝis, diversaj bonaj odoroj blovis renkonte al li, ĉar la onklo deponis en ĉi tiu ŝranko ankaŭ sian memkonservitan fruktaron, siajn fruktosukojn kaj brandojn.

Jen staris Schiller en mallarĝaj helruĝaj volumoj kaj aromis je rumprunoj ekde la poemoj ĝis la historio pri la tridekjara milito. Lessing apude elspiris fortigan bloveton de nuksobrando, dume la blu-vestita Grillparzer filiŝte odoris je mahaleboj. Sed poste venis vico de grandaj oraj libroj, ĉiu kiel generalo en parada uniformo — kaj tio estis Goethe. Li ampleksis la tutan larĝon de la ŝranko kaj pro tio ankaŭ pretendis pli da aromoj ol la tri aliaj poetoj kune. Liaj estis la delikata abrikotmarmelado, la ovokonjako kaj eĉ la ordinaran prunokaĉon li ne rifuzis ....

Du jarojn poste Hans Kell konatiĝis kun alia Goethe. Lia maljuna instruisto estis same aktoro kiel pedanto. Li estis aktorinta antaŭ ili la tutan biblion, ankaŭ la historion, kiom ĝi rilatis la elementan lernejon, kaj antaŭ Hans Kell persone eĉ unufoje la teruron de liaj gepatroj pri malbona noto en la atesto.

Li neniam povis paroli pri la kara Savinto sen iri kun levita kapo kaj etenditaj brakoj

Je memoro al Rudyard Kipling, granda bardo de Albiono.

(Mortinta antaŭ nelonge.)

Jam foriris kun glorkrono
Kipling, bard' de Albiono
Al la sfero, super ĉio —
Kie staras tron' de Dio.
Al Miltono, Tass' kaj Danto,
Ankaŭ Homer', reĝ' de l' kanto;
Ĉar ja Kipling, bard-poeto
Estis ankaŭ la profeto.
Kiel ili kaj Ŝekspiro
Tintis tondre li je liro
Dum kantado je honoro
De l' patruj' kaj Dia gloro.
Li foriris... sed nom' lia,
Kredu je mi — je l' vort' mia!...
Sonos ĉiam, kiel nomo
De Sokrato, saĝa homo.
Por Kiplingo, kvazaŭ — Dio,
Ditirambon kantos ĉiu,
Ne nur Brito — samlandano,
Sed de l' ĉiu homar' ano.
Ĉar li estis, kiel ĉiu
Poet' vera, er' de Dio;
Alivorte: Di-inspiro,
Bard' de l' ora, laŭta liro.

Kazis Vidikaŭskas, Philadelphia, USA.

La kontraŭuloj asertas,

ke Esperanto estas ne la sola projekto, kiu intencas fariĝi la internacia lingvo. Fakte; ĉar oni ja ne povas malpermesi al kiu ajn ambiciulo, elcerbumi novan projekton, kiun li mem eble opinias perfekta sed kiun la publiko ignoras. 99% el ĉiuj mondlingvanoj estas esperantistoj kaj maksimume 1% dividiĝas pri deko aŭ dudeko da aliaj projektoj, kiuj restis nuraj projektoj. Sekve Esp. estas la sola projekto, kiu jam ĉesis esti nura projekto, kiu jam fariĝis vivanta lingvo. (Laŭ „Heroldo")

Tutmonda Adresaro 1938

Mendu tuj la 128 paĝan belan, interesan, por vi kaj via propagando valoran libron. Nur 4 int. poŝtresp. kuponoj.

Tutmonda Adresaro (leter-adreso), Wien, I., Neue Burg, Aŭstrio.

EL LA MONDO

„Parolado de Ĉefministro Princo A. Konoe pri la Ĉina Afero en la 72-a Sesio de la Imperia Parlamento" aperis kiel represo el Orienta Kulturo, 4-paĝa.

„La Nova pro-Lingva Revuo" estas anoncita de la eldonanto Corrado Cerri, instr., Ramazzano, Italujo. Mendu provnumeron. Ĉu la unua numero jam aperis, ni ne scias, sed ĝi estis anoncita.

„Al la nova etapo", informbulteno internacia pri liberiga batalo de Ĉinio, 4 pĝ., sur verda papero, novaperis 1. nov. 1937. S-ro Johan H., P. O. Box 116, Canton, Ĉinujo. (Prezo ne fiksita, laŭpove donacu!)



La betonmiraklo de Wien.

Pri la nova akvujego en Wien, kiu kapablas enhavi 245.000 kubikmetrojn da trinkavo, venanta pli ol 100 km el la neĝmontaro, ni jam raportis. Nun vi vidas sur la bildo la ujegon, portata de 790 kolonoj 7 m altaj. Kelkcentmiloj da personoj rigardis ĉi tiun ujegon interne, la plej grandan betonkonstruaĵon en Eŭropo.

Brazilo. En la gazeto „Elo Fraternal", Bahia, aperis artikolo de d-ro Mildwurf - Wien „Esperanto — La interpopola ponto".

Grekujo. En Ateno E.-kurso kun la Reklerigataj Stataj Profesoroj de Normala Altlernejo, gvidata de prez. **d-ro Stamatiadis**, LK. En Neapolis vigla vivo dank' al la transloĝiĝo de la agema **K. Stefanakis.**

Koreo. Korea Esperantista Asocio en Seoul ekeldonas gazeton **„Korea Esperantisto"**, dudekpaĝan, nur en Esperanto, Seoul, 190 Johoku-ĉo.

EL LA LEGANTARO

„Por la dua eldono de TAE mi esperas kolekti multe de adresoj de esp.-istoj en nia lando. **Ivan K. Vasilev**, Sofia."

„Gajaj estu viaj tagoj en 1938-a jaro. Adolf Oberrotman, Warszawa."

„Kiel bele, ke la Adresaro alvenis antaŭ Kristnasko! Kaj ankaŭ la revuo denove estas tiel interesa!.... E. Buchty, Aaachen."

„Memkompreneble ankaŭ en la nova jaro mi restos fidela al AE. Via sindona Hans Zeller, Steyr."

„Hodiaŭ mi ricevis la Adresaron kaj mi dankas elkore pro la belega, bonega kaj gravega verkajo; ĝi faros al la esperantistoj tre utilajn servojn... F. Stengel, Wien (prez. de Aŭstria E.-Asocio)."

„Mi devas esprimi al vi mian admiron pri la vere belega kaj plaĉa libro. Jen adresaro, kiu sian nomon nepre meritas. Ĝi estas laŭ mia opinio la unua adresaro, kiu vere impone aspektas kaj efikas. Bonvolu do akcepti mian sinceran respekton. Karl **Franz**, Wels."

„Kore mi gratulas vin al TAE, ricevita la 24-an decembro, kiu estiĝis mia plej ĝojiga kristnasko-donaco. **Ing. Heinrich Peter**, Wien."

„Via Tutmonda Adresaro vere bone aspektas. La enhavo estas ankaŭ bone aranĝita. Estas vere, ke la libro ne povas enteni ĉiujn adresojn sed tio certe aranĝiĝos en postaj eldonoj. Via instituto faris unikan laboron en la vera senco de la vorto kaj mi estas certa, ke vi ankoraŭ ricevos multajn dankleterojn. Viajn instigojn mi certe bone encerbigis kaj mi agos laŭpove, por konvinki ĉiujn esperantistojn al mi konatajn pri la utila laboro, farata de vi en la servo de la esperantistaro tutmonda... **J. B. Pak**, Rotterdam."

„La libro tre plaĉas al mi kaj baldaŭ mi esperas, sendi pli da informoj... **W. Farrar**, Leicester."

---

tra la klasoĉambro. Kaj ankoraŭ en lia blankiĝinta vangobarbo pendis milda rideto: la paco estu kun vi!

Sed kiam li volis prezenti la satanon, tiam li faris ĝibon, krucis la brakojn super la konkava brusto kaj alpalpebrumis perfide ĉiun unuopan bubon tiel, ke tremfrosto atakis la plejmultajn....

Kiam ili en la legolibro estis venintaj al la balado pri la migranta sonorilo, li taksis la ĝustan tempon, venigi iufoje poeton antaŭ la okulojn de siaj lernantoj, „Johann Wolfgang von Goethe", li diris mistere, „estas nia plej eminenta poeto, karaj knaboj! Kune kun sia nobla amiko Friedrich von Schiller li promenas sur la eteraltaĵoj de germana poezio".

Kaj jam li paŝis, la manojn malfirme krucataj sur la dorso, kun noble leviĝanta kapo malrapide de la ŝtuparo ĝis la forno. Je tio li levis la piedojn pli alten ol kutime kaj surpaŝis nur per la piedfingroj; evidente por ĝuste klarigi la migradon sur eteraltaĵoj.

Hans Kell kun korbatoj estis konsentanta kun ĉi tiu Goethe; li ŝajnis al li mirinde konformi al tiu pompa librovico en la ŝranko de lia onklo....

En la mezlernejo poste ekzistis tute aliaj „Goethe". Unue ankoraŭ mildaj, agrablaj, kiel ekzemple la maljuna naturhistori-profesoro, kiu prelegis pri botaniko kaj zoologio, je kio li ŝajnis al Hans Kell je frata maniero ĉionscia. Li sciis interese rakonti ĉu li nun havis en la manoj la muelan denton de hinda elefanto aŭ nur galanton el Purkersdorf.

Kiam li unufoje pli longe parolis pri Goethe, okaze de unua tute modesta ekskurso en la gigantan sferon de la evolupenso, la bubo vidis la eminentan poeton dum pli longa tempo antaŭ si kiel sian naturhistoriinstruiston: en prudente ridetanta rakontado kaj samtempe ĉirkaŭblovata de delikata kamfor-odoro de liaj preparaĵoj....

Je ĉi tiu tempo estis ankaŭ permesate al li preni la librojn de sia onklo el la ŝranko. Kompreneble li elŝiris la orajn volumojn de sia multfigura favorato antaŭ ĉio kaj frande almordetis la verkojn ĉie per siaj spiritdentetoj, kiel pro ĝojo nedecida infano la mielkuktavolon, kiun oni jus estis donacinta al ĝi. Subite li haltis. Kion li do nur havis inter siaj dentoj, he? Insultan esprimon, tute veran, insultan esprimon kaj eĉ tiel vulgaran, ke malgraŭ liaj dekvar jaroj brilaĉis antaŭ liaj okuloj. Kaj kelkajn paĝojn poste aperis alia, kiu neniel postrestis la unuan je kota forto.

„Onklo", li vokis, „onklo, rigardu do!"

La onklo kiu jus ĉe la balkonfenestro lernigis al sia rano la larvet-englutadon, venis al li. Hans montris al la aĉaj vortoj, post kiam la onklo kun malafabla mieno prenis la libron de liaj genuoj kaj ree ŝlosis la ŝrankon. Ankaŭ Hans koleriĝis, sed lia malgranda kolero transformiĝis tute en miro. Tiu ĉi Goethe, fulmotondro, li estis ulo! La plej fama poeto, krome ĉionscia en naturhistorio kaj ankaŭ ree maldelikata kiel nur la plej senrespektaj fibuboj dum la paŭzo? ... Kara Dio, se tio ne estis energia!

Jes, la maldelikata Gothe plaĉis al Hans Kell baldaŭ pleje. Liaj jaroj konprenis lin, plukonstruis lin ĝis li egalis al mezlernejano dum la petol-aĝo kaj tiel oni estis trovinta kun malmulta penado genian kamaradon, per kies gaja aroganteco oni povis kontraŭi ĉiujn malagrablajn aferojn en la lernejo. Cetere Hans Kell jus komencis mem surpaperigi malglatajn versojn, pleje bombast-mallertajn juĝojn en rimoj pri filozofiaj sistemoj aŭ historiajn baladojn, preskaŭ

Konkurso por la Junularo.

Universala Konsilantaro por Kristana Vivo kaj Laboro.

Tutmonda Ligo por Intern. Amikeco per la Eklezioj.

52 Rue des Pâquis, Genève, Svislando.

Int. Kristana Junulara Komisiono organizas la trian fojon internacian konkurson, dank' al s-ino Anna F. G. van Loan el Usono, kiu memore al sia edzo starigis fondaĵon por plivastigi la spiriton de internacia amikeco kaj kompreno inter la junularo.

La partoprenontoj estas dividataj en: a) Gejunuletoj, naskitaj inter 1. 9. 1920 ĝis 1. 9. 1924; b) Gejunuloj, naskitaj inter 31. 8. 1916 ĝis 1. 9. 1920.

1. Temoj: La ĝeneralan temon „Kristo kaj la Universala Frateco" devos pritrakti jene: a) „Kian specialan kunhelpon la kristanoj povus alporti al la verko de la paco?" kaj b) „La kristanaj fundamentoj de la paco."

2. Premioj: Por ĉiu kategorio estas antaŭvidataj:

1 unua premio de 500 svisaj frankoj,
1 dua premio de 300 sv. fr.,
2 triaj premioj po 200 sv. fr.,
2 kvaraj premioj po 100 sv. fr.,
5 kvinaj premioj po 50 sv. fr.,
40 honoraj medaloj.

Krome la konkursantoj, kies verkaĵo akiros la mezvaloron, ricevos honoran mencion. Ĉiu laŭreata partoprenanto ricevos ankaŭ memor-diplomon.

3. Verkaĵoj. — La manuskriptoj, ne eldonitaj ĝis nun, devas enhavi ne malpli ol 1000 vortojn kaj ne pli ol 2000, kaj esti redaktataj en kiu ajn lingvo, se eble maŝinskribitaj, se ne, tre legeble manuskribitaj, kun marĝeno.

La nomo de la aŭtoro ne devas aperi sur la verkaĵo, sed nur la naskiĝtago kaj unu gvidvorto, kiu lasta devas esti ripetita sur fermita koverto, aldonita al la sendaĵo, en kiu estos almetitaj la nomo, adreso kaj naskiĝtago de la konkuranto. La verkaĵoj devas atingi la centron en Genève antaŭ la 1-a de septembro 1938, se estos centra oficejo en la koncerna lando, al tiu.

4. Juĝantaro. En ĉiu lando la manuskriptojn juĝos unua juĝantaro, aŭ se ne ekzistas en unu lando tia, tiam en Genève, kiu transdonos al la internacia nur la plej bonajn verkaĵojn el ĉiu kategorio, kiu — sidante en Genève — faros la definitivan klasigon.

5. Laŭreataro. — La nomoj de la gajnintoj estos anoncataj je Pasko 1939. Al la gajnintoj kat. b partopreno en Tutmonda Konferenco de kristana junularo (25. julio ĝis 3. aŭg. 1939) estos plifaciligata.

Araba fabelo.

De A. Smiling.

Ce la kortego de la potenca, ĉiopova reganto Harun al Raschid vivis la ŝatata poeto Jussuf. Neniu kapablis kiel li ĝojigi la animon de l' kalifo per sonoriĉaj versoj.

Iutage H. al R. diris „Neniam antaŭe vi kantis tiel bele kiel hodiaŭ. Diru tial, kion ajn via koro sopiras, kaj via deziro estos plenumita." Profunden klinis sin Jussuf kaj diris: „Plej potenca el la potenculoj, suno de Bagdad, plej saĝa inter ĉiuj regnestroj! Modesta estas mia deziro, kiel decas al poeto; donacu al mi po unu azenon de ĉiuj viaj subuloj, kiuj timas siajn edzinojn."



E.-grupo en Fayum. Nia egipta s-ano Mahrus (d. sidanta) sendis al ni la bildon.

Multajn semajnojn Jussuf restis for de la kortego, sed iutage granda popolamaso anoncis lian revenon; sennombra azenaro akompanis lin.

Li venis al la kalifo, kiu atendante sidis sur sia tono kaj diris: „Grandanima protektanto de l'morteculoj. Kiel mi danku al vi. Multajn landojn malproksimajn .ni travojaĝis kaj ĉie mi nur trovis virojn, kiuj havis timon antaŭ siaj edzinoj. Ĉiu obeis vian ordonon kaj donacis al mi azenon. Krome mi multon vidis dum miaj vojaĝoj. Mi renkontis inojn kun nepriskribeblaj beleco kaj gracieco, kun multa saĝeco kaj mirinda instruiteco. Sed la plej bela el ĉiuj, kiujn mi vidis, estis juna knabino, apenaŭ dekkvinjara, belega, floranta rozo kun fabela subtileco. Kaj mi pensis, tiun estaĵon nur indas la amo de l' kalifo."

„Silentu", interrompis H. al R. la poeton, mallaŭtigante la tonon de sia voĉo, „parolu mallaŭte Jussuf, por ke mia amata edzino Zobeida ne aŭdu viajn vortojn. Kie vivas tiu knabino, ho Jussuf?"

„La knabino", respondis Jussuf, „ja knabino nur vivas en la regno de miaj revoj. Sed vi, potenca kalifo, suno de Bagdad, vi ŝuldas al mi ... azenon."

Elgerm. Alice Falk, Wien.

Comenius-Esperanto-Societo.

Okaze de la vizito al Comenius-maŭzoleo en Naarden, Nederlando, fondo de Comenius E.-Societo estis proponita.

Comenius, eminenta ĉeha filozofo, unuaranga lingvisto, glora filologo kaj mondfama pedagogo okupis sin pli ol 30 jarojn en siaj verkoj pri la artefarota UNIVERSALA LINGVO.

Ĉiujare aperos almenaŭ 20-30-paĝa verko, kiu fidele redonos, kion Comenius tiurilate verkis. Ili estos interesaj por ĉiu esperantisto kaj servos bone al pedagogaj, filologaj kaj lernejaj aferoj.

Membro povas esti — kotizon oni ne pagos — ĉiu esperantisto, grupo kaj organizaĵo. La eldonajn elspezojn kovros libervolaj donacoj.

Anoncu vin al Julius Glück, Jacob Catslaan 18, Amersfoort, Nederlando.

---

kiel mantrikitaj ŝaflanŝtrumpoj. Malgraŭ tio estis feliĉego en ili kaj la lernejo signifis ne pli ol fora nubo....

Sed se Goethe nun estis fariĝinta kamarado, li tamen nenion estis perdinta de sia eminenteco kaj digno kaj oni povis eĉ pli forte vanti pere de li, kiam tio evidentiĝis necesa.

Jen Hans Kell iam vizitis parencinon, kiu loĝigis grekan kuraciston kiel subluanton. La homo havis grasan, pustolkovratan vizaĝon kaj parolis mankhavan, maldelikatan germanlingvon. Hans estis prezentita al li kiel studento kaj tio povis instigi la plej elegantan pseŭdo-grekon, ĵeti trans la posttagmez-kafotablon famajn nomojn kiel Homero, Plato, Phidias ktp. La junulo dum kelka tempo aŭskultis tion, tiam li prezentis al li sian Goethe kiel armilon. Sed tuj la pseŭdogreko mokridetis:

„Jes, jes, la Gette, li multe ŝtelis de nia Ewripides!"

„Kion vi diras?"

„Mi diras, la Gette multe ŝtelis.... de la nia Ewripides!"

Ĉu alia respondo estis ebla ol simple ĵeti al la grimacanta idioto sian sandviĉon en la vizaĝon? Ne! La paneto estis ŝmirata kun hepatpaŝteco kaj sur ĝi kuŝis tranĉaĵo da vinagro-kukumo; ĉiuj aĵoj, kiujn Hans ŝatis manĝi, sed tutegale! La paneto flugis al la malbone razita vango de la greko. Ĉi tiu ekridis kolere kaj etendis la manon al vangofrapo. Kvankam ĝi ne trafis la vizaĝon de la junulo, ĝi anstataŭe renversis plenan teotason. Dume kriis la onklino embarasite kaj daŭre: „Sed sinjoro doktoro! Sed Hans, ci petolulo! Kia konduto! Kia konduto!"

Oni disdonis ankoraŭ kelkajn puŝegojn ĝis kiam la helpantino venis el la kuirejo kaj ordis la dezertigitan kafotablon. Hans devis el la loĝejo; insultvortoj kaj lia griza ĉapo postflugis lin....

Dum la hejmvojo li ree pripensis la aferon. Se tiu grek-kanajlo tamen ne estus tute malprava! Ha, tiu ĉi Goethe! Ĉu li vere estis plagiatinta?... La greko kompreneble esprimis sin troigite; ĉe ili en la lernejo oni nomis tion: ŝtel-kopii. Kaj oni ne multe ĉagrenis, kiam tio koniĝis. Sed Goethe? Ne! Al tiu ne estis permesite ŝtelkopii! Hans fakte suferis korpan doloron. Ĉu li ne estis depost jaroj preta, respektegi la eminentan poeton kiel la plej altan? Eĉ kaŝe lin adori tre kore? Ne eble peti lin, kiel oni petis Dion aŭ Sanktulon... tio estis alia, pli fora... Dio estis kreinta la mondon: bone. Sed Goethe estis esplorinta la mondon kaj kompreninta, je alta, brila maniero. Tio estis homa kaj malgraŭ tio ege alta! Kaj nun ĉi tiu belega giganto laŭdire estis simple plagiinta? Ne, ne, ne! Tio devus esti tute egala por necerta lernejbubo! Ne, ne, ne! Sed kial tio tiam doloris tiel strange, se oni ankaŭ nur pensis pri ĝi?....

Nun venis aĉa tempo por Hans Kell. Li pasigis siajn tagojn ĉe rimfarado kaj piedpilkludado. Ĉio alia pasis preter li nur kiel nebulo. Plejofte li kuris spiregante post la bruna ledopilko; poste li ree plenskribis tutajn kajerojn je knaraj versoj. Fine li devis foriri el la lernejo kun malsukceso en preskaŭ ĉiuj fakoj kaj la plej malbonan noton pri konduto li krome ricevis.

Privatlernejo akceptis lin, kie ĉio estis malvasta kaj multekosta. Sed Goethe tie estis duoble reprezentata; kiel instruisto de la germana lingvo li trarigardis ĉion homan kun prudenta nervozeco kaj se ĝi ankaŭ minace alproksimiĝis. Malforta sed subtila

Nova Filmo: Gasparone (Ufa)

Leo Slezak kaj Heinz Schorlemmer.

Marika Rökk.

Papero en formo de koro,

dissendata de „Esperanta Koro“, Dubrovnik, Jugoslavio, sur unu flanko E-teksto, sur la alia la sama en la lingvoj angla, franca, germana, itala, ĉeha, kroata ktp. 10 pecoj kun lingvoj je via deziro 1 resp. kup.

Jen la enhavo: „Tiu ĉi koro parolas al menso kaj koro via. Ĝi defendas vin, sed ĝi postulas, ke ankaŭ vi defendu la aliajn. Ĝi sur la tuta mondo mobilizas heroojn kaj heroinojn, kiuj volonte ekiros en batalon kontraŭ kalumnio. Kalumnio kaŝe venenas, ruinigas ankaŭ tute senkulpajn unuopulojn, disigas familiojn, detruas societon kaj valorojn ĝiajn; semas malkonfidon kaj malamon; multajn ĝi pelas en ĉagrenon, mizeron, malsanon, malesperon kaj morton. Neniun ĝi indulgas. — Pripensu tion kaj estu homo! Solene promesu en koro via, ke vi neniam plu en iu ajn cirkonstanco kalumnios aŭ malbonfamigos iun ajn. Tiun ĉi koron portu ĉiam ĉe vi, por ke ĝi memorigu vin pri via sanktpromeso. — Sed, se vi aŭdas iun, ke li kalumnias aŭ malbonfamigas, kviete transdonu al li tiun ĉi koron! — Eble li komprenos vin kaj tuj ĉesos makuli proksimulon sian, kiu ne ĉeestanta ne povas sin defendi mem. Eble li apenaŭ poste ekkonos ĝian signifon. Vi faris la vian. — Esperanto batalas por la paco inter unuopuloj kaj por la paco inter religioj kaj popoloj. Per ĝi oni kolektas en la mondo batalantojn kontraŭ la kalumnio, ni kreas pacon, konfidon, kontentecon kaj feliĉon en la homaro. Tiu ĉi koro estas nia simbolo kaj batalilo!

„La devo, kiun vi divenas, ligas vin tuj de la momento, kiam vi ĝin divenis.“

Amiel.

movemo premegis sin tra la sulkajoj de la malfleksebla tuto kaj dispartigis ĝin kun diabla certeco en siajn mizere maldanĝerajn restajetojn.

Estis io nihilista ĉirkaŭ tiu Goethe, kio forprenis spiron kaj mediton, tiel ke oni forgesis demandi, kio ankoraŭ devus veni post ĉiuj tiuj satanaj dispecigoj. Malgraŭe tio ne finiĝis sen mistera revado ....

La alia Goethe estis la religi-instruisto. Homo de klara kaj forta prudento, kiu serioze atentis siajn lernantojn, sen fariĝi stultulo pro ili. Oni povis en la plej trankvila maniero ĉion priparoli kun li; li nek estis akra nek milda parolanto pri la mondo kaj ankaŭ ne klakis sian ŝtate protektitan doktrinon kiel vipon ĉirkaŭ la oreloj. Kelkfoje estis denuncita al li prudenta, nihilista eldiro el la literaturinstruado; li agis tute mallonge pri ĝi. Ne per la serpentsimila prudento, kiun ĝi mem havis, sed per forta ĝusta vorto, kiu ja sonis pli serioze, sed tamen ofte estis sufiĉa batilegbato por tiu saĝeco.

Hans Kell amis siajn du Goethe kun la sama inklino. Li admiris la prudente detruanton kaj la forte konstruanton; li ja ankoraŭ estis sufiĉe juna por povi havi la kredon, ke oni povas per unu paro da piedoj iri samtempe sur kelkaj vojoj ....

Dum la somero de tiu jaro li venis sola al onklino sur la kamparo. La gepatroj estis farintaj vojaĝon al Italujo kaj ne kunprenintaj lin. Dume ili nun en la sudo veturis de hotelo al hotelo, trenis sin tra preĝejoj kaj muzeoj, kaj trinkis la vinojn de la lando pro kaŝa sopiro al la patrolando, li vivis en ege simpla regiono, en iom pli granda foirego, en la domo de bonsituita kamparanino.

Unue li tre ĝuis, vivi tiel sendependе; sed baldaŭ tio fariĝis teda por li, malgraŭ li havis ĉirkaŭ si sufiĉan naturon por revi kaj sufiĉan blankan paperon por reteni sur ĝi siajn revoluciajn versojn. Tial estis certe bone, ke li konatiĝis kun Mylada Rosenstock.

En la gastejo tio okazis, ĉe glaso da lakto. Pri ŝiaj pli detalaj cirkonstancoj li ankaŭ pli poste ne povis fari al si precizan bildon. Ŝi estis luinta en vilao de la foirego ĉambron, neniam estis videbla sen libro en la mano kaj surhavis fantazie desegnitajn silkokimonojn. Enloĝantoj kaj libertempuloj samopiniis en sia juĝo pri ŝi: prudenta kaj senmorala! Sed la malgranda nigrehara ino allogis per maltima memfido sian tutan juĝantaron, kiel tio plaĉis al ŝi.

Ankaŭ Hans Kell ne ankoraŭ estis fintrinkinta sian glason da lakto kaj jam ŝi sciis, ke li estas respublika panteisto kaj skribas poemojn. Ŝi mem ankaŭ ne avaris je konfesoj. Laŭ ili ŝi estis studinta filozofion kaj ankaŭ dramaturgion, estis kelkfoje seniluziigata de la vivo kaj nun je serĉado al eksterordinaraj homoj. Fulmotondro, tia Hans Kell ja ankaŭ estis! Kaj tuj ankoraŭfoje fulmotondro! Kiel estus, se ili simple rigardus unu la alian kiel eksterordinaraj?! Ĉu li ne havis fortajn luktadojn kun instruisto malantaŭ si kaj krome skribis poemojn?!

Ili iris el la gastejo kiel malnovaj amikoj. Fariĝis bele inter ili, emocie bele. Foje ili travagadis la jumarbarojn en la ĉirkaŭaĵo kaj je tio ĝuis melankolion kaj sunvarmajn frambojn. Alian fojon ili sidigis sin en fora trinkejo kiel superhomoj je lakto kaj ovoj kun fandita graso. Ĉiam kompreneble Mylada influis; la junulo nur devis aldoni la entuziasmon de siaj jaroj. Ŝi sciis ĉion pri li, nur sian Goethe-kulton laŭ vivaj modeloj li ne ankoraŭ estis sciiginta al ŝi. Pri tio li tamen tro timis ŝian prudentan ridadon.

KOSMOPOLIS

La societo invitas al aliĝo, kotizo 8 ang. ŝ. jare, inklusive estas la duonmonata bulteno en E., sen tiu ŝ 5. La fundamentaj principoj: 1. Starigo de Tutmonda regado. 2. Socialigo de la ekonomiaj aferoj kolektivaj de la homaro tiel rapide kiel oni povos starigi kompetentajn instancojn. 3. Starigo de tutmonda sistemo de edukado nek militisma nek naciisma, sed humanisma kaj kosmopolita. 4. Garantio por ĉiu individuo pri la libero agi kaj sinesprimi kaj asociiĝi tiel libere kiel permesas la ĝenerala bonfarto. Tio inkluzivu liberon paroli kaj publikigi kaj seksegalecon politikan, socian, ekonomian. 5. Humanecigo de la jura procedo kriminala, per kio oni forigos vengajn punojn kaj apartigos por kuraca pritrakto la personojn socie malutilajn. 6. Plej bona distribuo de la mondloĝantaro. 7. Projektoj pri urboj kaj kamparregionoj. — Pri detaloj skribu al Mondsekretariaro de Kosmopolis, 165 Hampstead Way, London, NW. 11.

RECENZOJ

The E-Publishing Co. Ltd., London.

„Komuna Kantlibro“, redaktita de H. W. kaj N. Holmes, 1937. 64 paĝa. 1 angla ŝ kaj 1 penco aŭ 5 int. resp. kup.

Bela ideo, eldoni tian libron. Ĝi instigas kaj ebligas la kantadon en la grupoj kaj per tio plibeligon kaj pliagrabligon de la kunvenoj. La aldono de la muziknotoj estas tre agrabla, ĉar la diversaj nacioj ne konas la melodiojn de aliaj. Gratulon!

„La naiveco de pastro Brown“ de G. K. Chesterton, esp-igis d-ro Cecil Bean. 256 pĝ., prezo a. ŝ. 3/6, afranko —/4, 1937.

Ĉi tiu 13-a libro en la Populara E-Biblioteko riĉigas nian literaturon per nova detektivromano. Povas esti, ke multaj s-anoj ne ŝatas tian specon da literaturo; sed certe granda parto kun plezuro legas ilin kaj legos speciale ĉi tiun libron.

Do bonan amuzon kaj distron!

„Naiveco“ ne estas unusola romano, sed konsistas el dekdu detektivaj noveloj. Jam la unua estas vere interesa kaj streĉa kaj ĉiu nova denove rekompencas la leganton. Brown, la simpla pastro romkatolika, estas la ĉefaganto. Lia bona kaj intima amiko la franco Flambeau estas privata detektivo, sed antaŭe granda krimulo. Brown havas mirindan kapablon ekkoni krimojn kaj en tre mallonga tempo li povas nomi la kulpulon kaj la manieron, kiel li faris la krimon.

El la antaŭparolo de K. R. C. Sturmer oni sciiĝas, ke la verkinto estas malamiko de E. Ni esperu, ke li konvinkiĝos, ke Esperanto kapablas helpi.

Muusses Esp.-Biblioteko, Purmerend.

La serio ampleksas 10 volumetojn de 32—36 pĝ. en formato de 13×20 cm. 1 vol. kostas 0.35 ned. guld., la tuta serio 2.50 guld. afrank.

Nr-o **„La Avo“** de Aleksandro Petöfi, el la hungara trad. Ladislao Spierer.

Petöfi, la plej konata hungara poeto, estas speciale fama pro siaj poemoj. La avo estas unue tre simpla servisto sur la kamparo, poste bientulo mem. Li rakontas sian vivon, dum kiu li multe suferis en sia juneco pro la ĵaluzo kaj la ĉikanoj de l' filo de sia mastro. La novelo temas amon dum ava tempo; tro dolĉa, tro malmulte impuls-energia. — La traduko estas tre bona.

N-ro 9. **„La jusnaskito.“** Nekredebla historio de Ricardo Becerro de Bengoa; el la hispana trad. José Fernando Berrenguer.

La noveleto estas simpla sed ĉarma kaj la „nekredebla historio“ certe estos agrabla legaĵo por multaj. Ĝi temas pri plilongigo aŭ eĉ eternigo de la homa vivo.

N-ro 10. **„La jubilea Kongreso de Esperanto 1912“**, rememoroj kaj oficialaj dokumentoj, aranĝita kaj kompil. de Julius Glück.

En la jaro de la Ora Jubileo ĉi tiu rememoro pri la Arĝenta, kiun ankoraŭ ĉeestis nia Majstro, estas vere bona ideo. Ĝi enhavas la „cignan“ kongresparoladon de nia majstro, kiu certe tuŝos la korojn de ĉiu leganto. Kaj ĉiuj esperantistoj legu tiun libreton, kiu lerte estas aranĝita de nia pionira samideano Glück.

Korespondangulo

Hartberg, Stirio, Aŭstrio: Alois **Postl**, Grazergasse 30, 23-jara fraŭlo dez. konatiĝi kun belega f-ino pli juna ol li pro eventl. geedziĝo.

Wien, Aŭstrio. Joh. Reis, VII., Kaiserstraße 92 dez. kor. kĉl., certe respondos.

Sèvres Francujo: f-ino Marguerite Hérouard, 9 Grande Rue, deziras interŝanĝi belajn ilustr. pk. kun f-ino.

Ni re-enkondukas ĉi tiun rubrikon per versajo de s-ano Eduard Weber, membro de Klubo-Wien:

Por ke vi ne malsana estu,
Rapidvenigu kuraciston;
Kaj ke vi ĉiam gaja restu,
La Aŭstrian Esperantiston!

Ĉar tie en botel' troviĝas
La fama verda Ridigilo,
Kaj se malgaja vi fariĝas,
Ĝin tuj ekprenu, kara filo.

Observu ankaŭ laŭ ordono,
Al kiu nin la slip' instigas.
Ĝi estas la ridil' admono,
Ke gaja RIDADO SANIGAS!

Kantistino al teatra direktoro:

„Jen estas la atesto de l'kuracisto, diranta, ke pro raŭkeco de mia voĉo mi ne povas kanti hodiaŭ.“

Dir.: „Ke vi ne povas kanti? Pri tio mi ne bezonas ateston.“

•

Vilaĝanino pelis antaŭ si azenojn. Knaboj renkontis ŝin kaj kriis: „Bonan tagon, azenpatrino.“

„Koran dankon“, miaj infanoj, respondis la virino.

Tre ĝuste.

„Paĉjo, kion do havis la homoj antaŭ kiam ekzistis la radio-aparato?“ — „Hm, trankvilon.“

Ĝustigo: La titolo de la verko de Fr. Schreyvogel sur la lasta paĝo de no 12/1937 estas ĝuste „El Brigitte kaj la anĝelo“.

Eigentümer, Herausgeber, Verleger, verantwortl. Redakteur: Hofrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstraße 154. — Druck: Buch-, Kunst- und Zeitungsdruckerei „Albrecht Dürer“, Wien, VII., Bandgasse 28

Sed la nomo Goethe ofte estis elparolata inter ili. Mylada Rosenstock ŝajne multe sciis pri li; pri lia amovivo speciale.

Al la ekscitita junulo tio bonege plaĉis. Jam li komencis skribi ampoemojn al ŝi. Unue nur tute dolĉajn, ne klarajn; poste ĉiam pli precizajn, pli kuraĝajn. Kiam li havis tri dektuojn, li ŝovis ilin foje ĉe la vespera adiaŭo sub la brakon de la ineto kaj kuris hejmen.

„Eble mi tamen estis tro aroganta“, li pensis poste ĉe la tablo de sia onklino kiam oni dankis al la kara Dio por kaĉo kaj kremsupo en kelkajn metrojn longa preĝo. „Kial mi ankaŭ devas tuj eksplode montri mian amon“, li ekpensis senkuraĝe, dume dekstre kaj maldekstre de li la Ave Mario-preĝoj raslis el varmaj kamparanaj buŝoj en la krepuskon. Sed apenaŭ la onklino estis markinta la lastan krucsignon sur la dubkolora kalikota korsaĵo, la hundo en la korto ekbojis kaj Mylada Rosenstock naive eniris, por iri kun Hans je la vesperpromenado.

De la domo ili silente foriris. Ili mezuris la palan vojrubandon inter la herbejdorsoj per hezitaj paŝoj, dume altsupre la somernokto suprenrigardis al ili per ĉiam pli da okuloj. Fine Mylada diris tute mallaŭte: „Cu, knabo, ci min do amas?“

Kaj jam ŝi lin tiris malantaŭ avelujon kaj kisis lin, ke liaj tempioj muĝis. Kisado kaj karesado komenciĝis, ke la noktonigra arbetaĵo vibris. En la senfortiĝo Mylada Rosenstock ree fariĝis intelekta; ŝi komencis paroli pri la poemoj de Hans. Li kuŝis kun la kapo sur ŝia sino, sentis ŝian vizaĝon super la sia kaj aŭdis ŝin ĵus diri:

„Ĉu ci scias, kara bubo, ci estas verva kiel ... la juna Goethe!“

Li ĝemis forte kaj ebrie: „Tia mi volus esti, Mylada, jes! Diru al mi, ĉu vi opinias, ke oni povas fariĝi tia?“

Kaj Mylada entute ne ridis. Ŝi tute aferece opinias: „Mi preskaŭ kredas, ke vi kapablas al tio!“

Ho, ke ankoraŭ ĉiam ekzistis novaj varmaj ondoj en ĉi tiu bano de feliĉo! Ĉu tio entute estas ebla? Ĉu li do hodiaŭ malantaŭ ĉi tiu nigra avelujo falegu feliĉege kaj senfine de stelo al stelo! ...

Kiam li malfrunokte ŝanceliĝis en sian ĉambron, laca kaj senbrida samtempe, li devas regardi ĉe la kandellumo ankoraŭ longe en la spegulon. Li tamen deziras scii, kiel la juna Goethe aspektas! Tio ne estas ridinda ... tute ne ridinda ...

Kaj dum tuta varmega somermonato li restas por Mylada Rosenstock la juna Goethe ...

Malgraŭe li poste frekventis la Teknikan Altlernejon kaj fariĝis inĝeniero. Versojn li preskaŭ ne plu skribis. Li ankaŭ ne serĉis plu ium Goethe inter siaj superuloj. La tridekjarulon kaptis la milito kaj ĵetis lin al diversaj frontoj de lia endanĝerigata patrujo. Li suferis kun la aliaj, batalis kun la aliaj; malbenis kun ili kaj estis kiel ili ofte proksimege al la malespero. Kiam li ree revenis, li estis malriĉa kiel sia patrolando. Sed li komencis labori kaj tiel kunmetis la ruinajojn de sia ekzisto malrapide denove. Pri milittravivaĵoj li neniam parolis. Nur unufoje li diris, kiam oni parolis pri tiu tempo: „Mi estis al-najlinta malgrandan Goethebildon super mia loko en la subtera ŝirmejo, por ke mi povu kelkfoje trans ĉiu sanga frenezaĵo rigardi en homan, eternan vizaĝon. Alie mi ja estus devinta kriegi kaj eksteren kuregi kiel rabia lupo en la granatdisŝiritajn arbarojn ... Trad. Steiner.